KIOM DA KATOLIKOJ ESTAS EN LA MONDO?

Okaze de Monda Tago de Misioj, kiun oni solenis en la tria oktobra dimanĉo, publikigis agenturo Fides – kunigita kun Kongregacio por Evangelizado de Nacioj – aktualajn statistikojn de la katolikoj en la mondo. Ili baziĝas je informoj de Statistika Jarlibro de la Eklezio (Annuarium Statisticum Ecclesiae), enhavanta datumojn arigitajn al la 31-a de januaro 2013.

En ĉiuj kontinentoj daŭrigas kresko de populacio. Tutmonde alkresko faras 70,5 milionoj, el tio la plej granda, preskaŭ 28 milionoj estas registrita en Azio. Same la nombro de la katolikoj tiel kreskis en la mondo dum observata jaro je preskaŭ 25 milionoj, kaj tiel ĝi proksimiĝas al 1 miliardo 254 milionoj, kio prezentas tutan unu kvinonon de la tutmonda populacio. Ankaŭ tiu ĉi alkresko koncernas ĉiujn partojn de la mondo krom Oceanio, plej multe en Ameriko.

En la jaro 2013 kreskis ankaŭ en tutmonda skalo nombro de sacerdotoj – je 1035. Sed ĉe pli proksima rigardo temas pri alkresko precipe en Afriko kaj Azio, dum en Eŭropo ĝi malkreskas. Je 1091 alkreskis ankaŭ nombro de konstantaj diakonoj kaj je 5000 alkreskis nombro de laikaj misiistoj. Tutmonde kompare al tio malkreskis nombro de seminarianoj. Ununura kontinento, kie estis ilia kresko, restas Afriko. ■

Laŭ www.radiovaticana.cz, 21.10.2015